

"La ideo de dauropoveco estas nek intelektazho de modernai teknokratoj nek fulmideo de ekologiema frenezuloj..., ji estas nia origina monda kulturheredazho." (Ulrich Grober, 1).

# **Kulturoj de dauropoveco -** **la ekologia dimensio de Esperanto** **(Cheno de argumentoj)**

(- skribita en RALFO (\*))

La tie ĉi submetita kontribuazho priskribas la en Esperanto immanentajn aspektojn, kiuj rilatas al transdisciplinaj kaj transkulturaj perspektivoj de la ekologio kaj kialigas-fundamentigas ĵiajn signifojn kaj aplikojn kadre de la kulturoj de dauropoveco. La teksto estas intence densigita kaj prezentigas iom tezoforme.

1

## **1.**

La du universale agnoskataj bazaj faktoroj de la ĉi tie priparolata koncepto de dauropoveco resp. de dauropova evoluo (Angle "sustainability" resp. "sustainable development" estas

**1. la limoj de nia unu komuna Planedo Tero** kaj

**2. la naturaparteneco de la homo**

(en la senco, ke la homo estas "nur" parto kaj partnero en la tutrilataro de la viva materio.)

Ji priskribas kaj celas la utiligon de regenereblaj sistemoj de la biosfero che konservado de ties esencaj trajtoj (1, 2, 3,4). Ni parolas pri **ekologia dauropoveco**. Tio ĉi difinitas kiel "konservi la kapablon de sistemo rilate al materialaj kaj funkciaj resursoj tiel, ke ĵi daŭre restas vivopova" aŭ pli praktike "ne preni pli multe el la naturo ol povas esti redonata per regenerado-reciklado

kai sharji la biosferon nur per tiom da toksoi-malpurazhoi (mediopoluado) kiom ji sen damaĵo povas kompensi (medioeltenpovo, almedia konformeco)". Agadmaniero estas ekologie daŭropova, se ĵi povas esti daŭrive praktikata futuren sen difektoj por la biosfero.

La aktuala situacio de la mediodetruo estas interalie priskribata en la Living Planet Report 2012 de la World Wildlife Fund (WWF). Laŭ tiu la nuntempa tutkonsumo de la homaro superas la kapaciton de la Tero pri resursoj kaj regeneropovo je 30 - 50%, tiome, ke ekde la jaro 2030 necesus dua Planedo por kovri ĉi troan konsumbezono. Ĉi lasta pleigrandparte rilatas al nutrazhoj (aparte viando), akvo, energio kaj krudmaterialoj samkiel al spaco por infrastrukturoj. Estas eksplicite starigata la postulo pri "reveno de la mondo sur voyon, kiu ebligas konsumon kadre de la limoj de la Planedo" (5). Resume tekstas en la "Charto de la Tero" (6): "La manieroj de produktado kaj konsumado kausas ruiniĵojn de la medio, troeksploataĵojn de la resursoj kaj masivan speciopereon. Ili subfosas nian soci(al)an koheron. La enspezoj de la ekonomia disvolvigo ne estas ĵuste dividataj kaj la breĉo inter la riĉuloj kaj malriĉuloj pliprofundiĝas. Malyusteco, malriĉeco, neklerigo kaj perfortaj konfliktoj disvastigas kaj estigas grandajn suferojn. Senmodela kreskado de la mondlojantaro trosharĵadas la ekologiajn kaj socialajn sistemojn. La fundamentoj de tutmonda sekureco estas minacataj. Tio estas danĝeraj evoluoj, sed ili ne estas nevenkeblaj." Ambaŭ ĉi publicazhoj ilustras modele la jam 1982 formulitajn por nia mondo minacajn problemkampojn de karbondioksido, investmono kaj troloĵateco (7). La klimatoshanĵigo (tergloba altiĵo de la chegrunda temperaturo je 0,74°C) (8) kun sia potencie katastrofigaj sekvoj estas kausata ĉefe antropogene per bruligo de fosiliaj energiportantoj (industrio, trafiko, komunikado), senarbarigo kaj agrikulturo-bestbredado).

Konkludo: **La (ekologia) daŭropoveco hodiaŭ ne plu estas opcio, sed porekzista demando, trafanta ĉiun (9).**

## **2.**

La situacio de nia nuntempa globalizita-globaliziganta mondo surbaze de kapital-novazh-teknologi-apogata ekonomia kreskomodelo (10, 11, 12, 13, 14) karakterizatas per tio oni nomas la tutmondan krizon. Ĉi tiu konsistas el la antagonismo inter

1. la **krizo de yusteco** (20% i de la homaro en la evoluitaj industri- kaj konsumnacioj produktas kaj konsumas 80% in de chiuj resursoj kaj varoj kaj per tio estigas propran riĉecon koste de malriĉeco kaj subnutrateco de la ceteraj regionoj de la mondo) kaj
2. la **krizo de la medio** (la stato de la biosfero malplibonigas kontinue kaj mezureble).

La problemoj konsistas en tio, ke la yustecokrizo devas esti solvata sen pliakrigi la mediokrizon. **Ni bezonas ambau - pli yustan mondon kaj sanan medion.** Principe (t.e. mezureble) tio atingebblas nur per rezigno de la konsumsocio en la pli evoluitaj ŝtatoj, t.e. per redukto de la "konsumado den mondo" per nia vivostilo (kapvortoj: efikeco, ekosufiĉeco, kulturo de malplio, sociala daŭropoveco, senglobaliĝo - 15, 16, 17, 18, 19).

### **3.**

La Monda Komisiono pri Medio kaj Evoluigo publicis en la jaro 1987 sian finan dokumenton "Nia Komuna Estonteco" (t.n. **Brundtland-Raporto**). En tiu daŭropoveca evoluigo estas difinita jene: "Igi evoluigon futuropova signifas, ke la nuntempaj generacioj kontentigas siajn bezonojn sen endanĝerigi la kapablon de la futurai generacioj kontentigi iliajn proprajn bezonojn." La sekva frazo tekstas "La koncepto de daŭropova evoluigo implicas limojn..." (20).

Ekde la Rio-Konferenco 1992 pri Medio kaj Evoluigo kaj ties internaciaj mediokonvencioj validas por la plua evoluigado de la homaro la 3 gvidprincipoj

1. **Paco,**
2. **Homaj Raitoj** kaj
3. **Daŭropoveco.**

Tio signifas, ke chiuj decidoj en la kvar kampoj de **ekonomio (yusta mondo), ekologio (vivopova mondo), socialo kaj kulturo (vivinda mondo)** mezurendas je tio, ĉu ili servas la pacon, kongruas kun la homaj raitoj kaj adekvatas al la kriterioj de daŭropoveco. En la tensiokampo de ekonomia, ekologia, sociala kaj kultura daŭropovecoj laŭprudente devas prioritati la celo de ekologia daŭropoveco, ĉar la protekto de la naturaj vivokondichoj estas la antaŭkondicho ankaŭ de ekonomia kaj sociala stabilecoj (21).

La **Agenda21** (UN, 1992) prezentas universalan programon por kultur-shanjiĵo, en kiu estas aparte alparolataj la civilsocio (Neregistaraj Organizazhoj, NRO ktp.) kaj la regionaj-lokaj sferoj.

## **4.**

La nocio "**Kulturoj de Daŭropoveco**" rilatas al la serĉo kaj evolu(ig)o (21) de kulturkoncepto, kiu sin orientas je la gvidkoncepto de ekologia daŭropoveco. Tio signifas ĉefe insisteman realigon den konscioshanjiĵo laŭ tutmonda skalo ("global mindset"). Ni parolas pri pacaj-kunlaborivaj transformprocesoj.

Kultura daŭropoveco konkretiĝas forme de kulturoj de daŭropoveco: Kulturoj, kiuj "scias", ke la homfarita krizo de la globalizita mondo estas krizo de la kulturo, t.e. krizo de la homa prudento. Ĉar la vorto "kulturo" venas de la hindogermana vorto "kuel-" = "esti diligente okupata", oni povas sin demandi, ĉu ĉiokuntekste temas pri porekzista krizo de la "diligenta okupateco" de la homo. La t.n. "novigazhoj" kaj la fiksigo je ekonomikreskado kaj teknologioj ĵis nun kondukis nek al decide pli multe da tutmonda ĵusteco nek al "mezurebla" medioprotekto, ili preferas akriĝas la terglobo krizon (23, 24), ekz. pro mallongigo de la produktadocikloj kaj la imantaj disipotendencoj (t.n. resaltoefektoj). Necesas paradigmatransigo kaj revalorigado (9), "kompren(em)o pri daŭropoveco, kiu egaltraktas kun la "tri kolumnoj" ekonomio, ekologio kaj socialo ampleksas ankaŭ kulturon kiel kvaran dimension; kiu komprenas-realigas la sur diverseco, malfermiteco kaj reciproka intershanjado bazitan formadon de la kampoj ekonomio, ekologio kaj socialo kiel kulturan-estetikan ĵisformadon de daŭropoveco - kulturnocio, kiu devenas de la naturaparteneco de la homo kaj principe kulpigas la interrilataron de la viva, kiu ampleksas samgrade homon kaj naturon (25, 26)." Kulturoj de daŭropoveco bazigas i.a. sur la "Konvencio pri la Protekto kaj Progresigo den la Diverseco de Kulturaj Esprimformoj" (UNESCO, 2005), sur la koncepto pri transkultureco (27), sur la "Charto pri Transdisciplineco" (28), sur sistempensado, sur konsekvenca partoprenigo de la civilsocio, sur demokratio, sur la protekto kontraŭ patentoj pri homaj genoj, sur kulturo de malplio, sur la integrado den la potencialo de la artoj (29, 30) kaj fine ankaŭ sur la daŭropoveco

de la kulturo mem. La kernaj demandoj tekstas: "Kiel ni transiru de la ekonomie centrigita kulturo de la tutmondigado al social-ekologia kulturo de dauropoveco? Kiai organizai kaj komunikadaj formoj progresigas la kulturan diversecon anstataŭ detrui ilin? (9) Dauropoveco bezonas ne nur novajn paradigmojn, mondkonceptojn kaj valorojn (kulturo de dauropoveco), sed ankaŭ novajn komunikadformojn (kultura strategio de dauropoveco), kiuj kontinue progresigas kulturan evoluon kaj inhibas la efektivigon de memreferencemaj mondkonceptoj (ideologioj) (9)."

Facile ekkoneblas: Esperanto estas unu el tiuj ĉi strategioj...

## 5.

La 3 karakterizaj elementoj de la tradicia kulturnocio estas etna fundamento, socia homogenigo kaj interkultura dislimigo (la t.n. kuglomodelo de la kulturoj). Intertempe evidentigis, ke tiuj ĉi kaj priskribe kaj normige fariĝis malaktualaj. Plej malfrue ekde la tutmondigo (tutergloba varotrafiko, interreto, televido, migradofluoj ktp.) estas kaj por la individuoj kaj por la kolektivoj nur tre limigitaj etnaj substancoj kaj efikaj dislimigoj. Kie ajn tiuj ĉi estas eldevegataj estigas gravajn problemojn koncerne al (kultur-)rasismo, fundamentismoj kaj totalecaj strukturoj kun la "fatala duoblo de interna devigo al unueco kaj alekstera blokado" (27). Kaj la nocio de "interkultureco" esence (nur) konservas ĉi tradician kulturmodelon sur la nivelo de reciproka interpaco de la diferencaj kulturoj.

**Transkultureco** provas ĵiskonsideri la realajn hodiaŭajn kondiĉojn de kulturo(i): la hibridigon de unuopaj kulturoj, la transkulturajn vivoformojn, la estimadon pri kulturmiksoj ("Eĉ se ne genetikaj, ni estas kulturaj hibriduloj. (27), "cross-cutting identities" ("transtranĉajn identecojn"), la retigon de ĉiuj vivosferoj, la transdisciplinan aŭ transversan penskonceptojn en la sciencoj. **La kultura formigado de la individuo ne nepre multe rilatas al la aparteneco al iu ŝtato aŭ nacio** (27). La koncepto de transkultureco celas integran, neapartigatan komprenon pri kulturo. Tio ne automate signifas la malaperon de kulturaj apartaĵoj aŭ resursoj, sed jes ja la de la realo eldevegata kaj en la realo efektivegata diverseco de diferencaj vivoformoj de transkultura tipo ĉe altgrada individuigo kaj plurmodela diferencigo per kulturaj intersanĝaj procezoj kaj integriĝoj sur transversaj niveloj. (27)

## 6.

Dum la evolupovo de naturaj sistemoj bazigas sur la biologia diverseco (vd. Konvencion pri Biodiverseco, UN 1992), la evolua kapacito de sociaj sistemoj antaŭkondičas kulturan diversecon ((9), vd. Konvencionpri la Protekto kaj Progresigo den la Diverseco de Kulturaj Esprimformoj, UNESCO 2005). **Kulturo, lingvo kaj komunikado** estas decidaj sferoj de la homa ekzisto (interreto, lingvo- kaj informservoj, kultur- kaj sportindustrioj ktp.) Sed sendepende de siaj unuopaj difinoj ili devas lasi sin mezuri laŭ la principo de ekologia daŭropoveco. **Kulturo ne pravigas mediodetruon** - tia la moto. Ĉe tio laŭ la difino de la UNESCO "kulturo ne nur inkludas arton kaj literaturon, sed ankaŭ vivoformojn, la bazajn homrajtojn, valor sistemojn, tradiciojn kaj kredojn (31)." La nedaŭropovaj, medioendanĝerigaj efikoj de aplikata kulturo estas facile exploreblaj en la interreto. Ĉi lasta mem intertempe produktas mondvasse tiom da karbondioksido kiom la tuta aertrafiko, kun altiga tendenco. Simila validas por la produktado kaj la konsumo de papero samkiel por la "malpura" turismo. En la t.n. Marakesh-Proceso de la Medioprogramo de la UN, kiu sin okupas pri la progresigo den daŭropovaj konsumado- kaj produktado-formoj, komunikado ja estas unu de la fokusaj temoj (32). Ĉi tie konkretigas la imagojn de la homoj pri kio estas nomata la troiko de la daŭropovaj strategioj: **Konsisteco** (daŭropoveco kiel principo) plus **efikeco** (plei altaj energi- kaj resusosparemaĵoj opcioj por ĉiu celo) plus **suficheco** (la justa mezuro, atentemo pri limoj) (33). Kiel pliaj kriterioj kuntekste de "kompetenta kulturo de malplio" estu menciitaj la principo de **preventivo** kaj la maksimumo **"Kaze de dubo ne!"**. La lasta signifas, ke la malutilo de iu rimedo-paŝo ne devas esti science 100%-e pruvita por sin deteni de ĝi (ekz. la disputo pri la Formulo 1).

6

## 7.

Antaŭ la fono de la ĝustaj prezentitaj gvidideoj "daŭropoveco" respektive "daŭropova evolu(ig)o" kaj transkultureco la neutrala internacia lingvo Esperanto estas tie ĉi novdifinita laŭ ekologia-sistemteoria perspektivo - kiel parto de la kulturoj de daŭropoveco, en kiuj la krizo de prudento estu superata per konscia "kunpensado" de la homoj kaj naturon ampleksantan vivokuntekston. Devenpunkto estas la reciproka materiala, energia kaj komunikativa rilataro inter naturo kaj kulturo (naturkulturoj):

**Esperanto kiel kultura (antropogena) ekosistemo**, kiel ekologie-sociale dauropova lingvo-mondo-sistemo (34). Chi nova identeco de Esperanto estas principe diferenca de tiu en chiu etna lingvo lau tio, ke ji atribuas al Esperanto ekologian dauropovon kiel imanentan traiton. Chi cirkonstanco jis nun restis praktike neatentata en chiui argumentoi kontrau (kai ankaŭ favore al) Esperanto. Ji formas la centran apogilon de futuren sin orienta lingvopolitiko en la senco de la moto de la UN-Konferenco Rio+20 (2012): "The future we want" ("La futuro, kiun ni volas.")

Intertempe la socio ekkonis, ke nia unu mondo estas minacata ankaŭ per (pleiparte) pacai rimedoi kai lau (pleiparta) konsideremo de la homai raitoi (en ties aktuala formo). Juste pro tio la nocio de (ekologia) dauropoveco ya aldonijis kiel tria baza principo de la UN. Al chi fakto ankaŭ universala komunikad-koncepto kiel Esperanto, aparte en jiai organizitai formoi, ne povas rifuziji. Pro tio la aplikado de Esperanto en la postondoi de globalizai kai detruai konceptoi pri ekonomia kresko estas kontrauproduktiva evoluo koncerne internacian kai transkulturan komunikadon. Demandendas: Se Esperanto plibonigas la mondvastan komunikadon, chu ji (kvazau) automate ankaŭ "plibonigas", t.e. plifortigas, la tuttergloban detruon? Tia scenaro memorigas pri kio iam diris la Usona ekonomiisto Herman Daly: "Fari ech pli bone ion, kion one tute ne faru, estas tre perversa formo de progreso."

7

## **8.**

**Esperanto estas la lingva parto de (ekologie) dauropova ((kai (sociale) integra)) internacia kai transkultura komunikado.** Tia la tezo de la kulturoi de dauropoveco: La "natura" pluformigo de la "interna ideo" de Esperanto (frateco kai yusteco) konsistas en la malkovro kai konkretigo de la al Esperanto imanenta ekologia dimensio. Nur tiel la koncepto de neutrala internacia lingvo plenumas la tri bazajn principojn de la UN: paco, homai raitoi kai dauropoveco.

Chi dimensio estas kialigebla. Kontraste al chiu etna lingvo Esperanto estas kadre de la kulturoi de dauropoveco (social-)ekologie dauropova rimedo-ilo de komunikado, char ji el si mem estas preventiva. Nur malmultai homai eltrova-zhoi povas aserti tion pri si. Chi imanenta dauropoveco prezentijas en tri formoi:

1. kuniga lingveco
2. demokratia dulingveco
3. ekologia dauropoveco

Detale tio signifas la yenan:

### pri 1.

Humanekologie kai rilate la mondvastan krizon de biologia-kultura diverseco (pereco der specioi kai lingvoi-kulturoi) Esperanto estas kuniga ("unuiga") lingvo. Kiel "1 lingvo por chiui" Esperanto signifas universalan vivoformon, kiu el si mem ("dekomence") respektas chiun gepatrain lingvoin kai ties kulturoin, kiel modelo la gepatrain lingvoin kai kulturoin de chiui, kiui jin uzas en dialogo, diskuto kai interkomprenigado kiel superan identecon - per kreado den unika "rezervuyo" de scioi-konoj, spertoj kai integropovo pri universale vivata transkultureco.

### pri 2.

Laukvalite kai rilate la mondvastain yusteco- kai egalecokrizon la aplikado de Esperanto kiel "1 lingvo por chiui" sur transkultura, interetna kai internacia niveloj signifas soci(al)e dauropovan komunikadon, char ji reduktas el si mem ("dekomence") soci(al)ajn riskojn kai che tio ne permesas avantaj(ig)on al aina etna lingvo - per realigo den egaleco kai yusteco lau la principo de "demokratia dulingveco".

Esperanto sukcesas en kio estas karakterizita de la Germana filozofa J. Habermas kiel "fundamento de la ideala parolsituacio - egaleco pri la shancoj realigi parolon." (35)

### pri 3.

Laukvante kai rilate la mondvastan mediokrizon la aplikado de Esperanto kiel "1 lingvo por chiui" sur regiona kai superregiona niveloj signifas ekologie dauropovan komunikadon, char ji el si mem ("dekomence") grave reduktas riskojn por la medio kai malavantajojn por la biosfero - per realigo den universala medioprotektado lau la ekologia principo de evito den resursodispado kai de toksado den la medio (detaloj: 36).



La **Manifesto de Prago** (1995) (37) ne nur rekonfirmu la tradiciajn celojn de la Esperanto-Movado, sed ankaŭ antaŭenigu la lastan en direkto al daŭropoveco, eble per yena preamblo:

"Biosfero kaj justeco. La homa specio estas parto kaj partnero de ĉio viva sur nia unu komuna Planedo. La homfaritaj krizoj de justeco kaj medio koncernas ankaŭ la komunikadon-kompreniĝadon inter individuoj kaj kolektivoj sur regiona kaj superregiona niveloj. En la globalizanta mondo la memorganizado-memkonservado de la pensa viva materio direkte al kaj avantaĝe por si mem devas fariĝi kolektiva kaj komunikada inteligento por la viva entute. Esperanto estas neetna pontolingvo kaj kiel 1 lingvo por ĉiuj imanente neutrala, lingve kompetenta, egaleca-justiga kaj materiale maldisipa. Ni asertas, ke la tutmonda komunikado devas okazi laŭ principoj de dekomenca daŭropova evoluo, t.e. nedifektemo kontraŭ la biosfero kaj de atingado de la tutmonde homa justeco. **Ni estas movado de unuaranga daŭropova interkomunikado-interkompreniĝado.**

La kulturoj de daŭropoveco postulas ankaŭ al la Esperanto-movado, ke ĝi (kiel ĉiu evoluigo) moviĝu por ne endanĝerigi la naturajn vivobazojn. La novazhema teknologio (t.e. la lingvo mem) ja pretas esti aplikata, la novazhema organizado (t.e. la Movado) devas sekvi tion.

Resume kaj sendepende de la Movado:

**Ĉiu homo havu egalrajtojn laŭ ebleco, per laŭeble egalaj kaj malgrandaj materialoj kaj mensaj investoj kaj per minimumo da malutilo al la medio atingi la kapablon komuniki per rekta, de tria persono sendependa dialogo sur internacia kaj transkultura niveloj kaj demokratie partoprenigi sin kaj sian kulturon.** (38, modifita de la aŭtoro)

## **9.**

La evolucio ekpilis la sin organizan homon per **konscio, scioj, konscienco kaj volo.** Ĉi karakteriziloj okazas de neceso povas generi novajn valorojn kriteriojn en teorio kaj praktiko, t.e. per **konscia ŝanĝado de la propra pensado kaj agado** direkte al konkreta kaj efika kreado de universala justeco kaj konservado de la integra biosfero. Ĉi tio kompreneble validas ankaŭ por la kampoj de komunikado ĝenerale kaj de Esperanto speciale. Enkonduko

kai aplikado de Esperanto kiel transkultura kai internacia lingvo de chiui estas pli multe ol etika apelacio. Kiel parto de la "kultura shanjigo" ("cultural turn") (39) de nia epoko ji signifas konkretan pashon en la direkto al agnosko de la finiteco-limigiteco de nia nuntempa merkatkreskofiksita modelo de progreso kai deturnijon for de la detruiva memreferencema kulturo... kai ties ekskludivai tendencoi - transe de la de la Angla dominanta konsumorientigo de nia globalizita mondo kai chiu multkultura hibridigo... En la sfero de universala komunikado Esperanto signifas gravan reorientigon al dauropovai vivostiloj kiel socikultura projekto de kunlaboriva futuroformado.

## **Kompilis (05/2013)**

Wolfgang Günther (UEA, AVE, Nula Horo)

10

Esperanto-Centro Harleshausen  
34128 Kassel, Wilhelmshöher Weg 11  
Germanio

w.guenther.esperanto@web.de

### **(\*) RALFO (RAcia ALFabetO)**

1. Anstataŭ j & la chapelitaj ĉ, ĝ, ĵ, ĥ, ŝ, ŭ  
oni uzas y/i & ch, j, zh, kh, sh, w/u sen diakritaj signoj
  2. y & w en ne fino de silabo: yes, sinyoro, westo.  
i & u kiel/en lasta vokalo de silabo: kvin, kai, plus Europo, ankaŭ
  3. + q & x en sciencaj tekstoj
- Ekzemplo: "Sinyorino Wang joyas ĉar ŝi zhus audis ekhoin.

## **Literatur**

- (1) Grober, U: Die Entdeckung der Nachhaltigkeit. Verlag Kunstmann, 2010. ISBN 10-3888976480
- (2) <http://de.wikipedia.org/wiki/Nachhaltigkeit>
- (3) Grabe, L: Das Projekt Nachhaltigkeit. Cultura21 eBooks Series on Culture and Sustainability, 2010
- (4) von Carlowitz, H.G.: Sylviacultura oeconomica. 1713. Verlag Kessel. ISBN 978-3-941300-56-9
- (5) [www.panda.org/about.../living\\_planet\\_report](http://www.panda.org/about.../living_planet_report)
- (6) Charta der Erde. [www.earthchartainaction.org/.../fur%20Kinder%20German.pdf](http://www.earthchartainaction.org/.../fur%20Kinder%20German.pdf)
- (7) Hamaker, J.D.: The Survival of Civilization - Carbon Dioxide, Investment Money, Population. Hamaker-Weavers Publishers, 1982. ISBN 0-941550-00-1
- (8) [de.wikipedia.org/wiki/Globale\\_Erwärmung](http://de.wikipedia.org/wiki/Globale_Erwärmung)
- (9) Brocchi, D.: Die kulturelle Dimension der Nachhaltigkeit. 2008. <http://www.magazin.avinus.de/2008/01/26/brocchi-kulturelle-nachha...>
- (10) [www.globalisierung-infos.de](http://www.globalisierung-infos.de)
- (11) Seidel, I, Zahrnt, A. (Hrsg.): Postwachstumsgesellschaft: Neue Konzepte für die Zukunft. Ökologie und Wirtschaftsforschung, Band 87, Metropolis, 2010 978-3-89518-811-4
- (12) [roottensystem.blogspot.de/.../Folien\\_Systemische\\_Ursachen\\_der\\_glob...](http://roottensystem.blogspot.de/.../Folien_Systemische_Ursachen_der_glob...)
- (13) [vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/wachstumskritik.html](http://vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/wachstumskritik.html)
- (14) [www.mitwelt.org/wachstum-wachstumskritik-information.html](http://www.mitwelt.org/wachstum-wachstumskritik-information.html)
- (15) Sachs, W.: Ökologie - die neue Farbe der Gerechtigkeit. 2002. Sachs, W.: Ohne Ökologie keine transnationale Gerechtigkeit. POLIS, 1, 2004
- (16) [de.wikipedia.org/wiki/suffizienz\\_\(ökologie\)](http://de.wikipedia.org/wiki/suffizienz_(ökologie))
- (17) [de.wikipedia.org/wiki/Ökoeffizienz](http://de.wikipedia.org/wiki/Ökoeffizienz)
- (18) [de.wikipedia.org/wiki/Soziale\\_Nachhaltigkeit](http://de.wikipedia.org/wiki/Soziale_Nachhaltigkeit)
- (19) [www.globalisierungsdebatte.de/entglobalisierung.html](http://www.globalisierungsdebatte.de/entglobalisierung.html)
- (20) Brundtland-Bericht unter [www.jenseits-des-wachstums.de/index.php?id=85358&L=28id=8535](http://www.jenseits-des-wachstums.de/index.php?id=85358&L=28id=8535)
- (21) <http://de.wikipedia.org/wiki/Drei-Säulen-Modell...>
- (22) Kagan, S.: Cultures of sustainability and the aesthetics of the pattern that connects. Futures: The journal of policy, planning, and futures studies, vol. 42, n. 10, 2010
- (23) Sachs, W.: Die Armut sinkt, aber die Umweltkrise verschärft sich. [www.ci-](http://www.ci-)

- romero.de/file/admin/download.../2005\_2\_umweltkrise.pdf
- (24) The closing circle neu gelesen. [www.umweltethik.at](http://www.umweltethik.at)
- (25) Kurt, H., Wagner, B. (Hrsg.): Kultur, Kunst, Nachhaltigkeit. Essen: Klartext Verlag, 2002.  
vgl hierzu: Tutzingener Manifest, Evangelische Akademie Tutzing, 2001. [www.kupoge.de/ifk/tutzingermanifest](http://www.kupoge.de/ifk/tutzingermanifest)
- (26) Krainer, L., Trattnigg, R. (Hrsg.): Kulturelle Nachhaltigkeit, oekom 2007. ISBN 978-3-86581-080-9
- (27) W. Welsch, Transkulturalität - die veränderte Verfassung heutiger Kulturen, VIA REGIA, Heft 20/1994 (<http://www.via-regia.org>)
- (28) [basarab.nicolescu.perso.sfr.fr/ciret.../charten.ht...](http://basarab.nicolescu.perso.sfr.fr/ciret.../charten.ht...)
- (29) Kagan, S., Kirchberg, V.. (Hrsg.): Sustainability: a new frontier for the arts and cultures, VAS, 2008. ISBN 978-3-88864-440-5
- (30) Kagan, S.: Art and Sustainability, transcript 2011,. ISBN 978-3-8876-21803-7
- (31) <http://www.scribd.com/doc/48978808/UNESCO-Definition-von-Kultur>
- (32) [www.bmu.de/produkte\\_und\\_umwelt/internationale\\_aktivitaeten\\_auf\\_un\\_ebene/doc/39053.php](http://www.bmu.de/produkte_und_umwelt/internationale_aktivitaeten_auf_un_ebene/doc/39053.php)
- (33) [www.oeko.de/oekodoc/1318/2011-437-de.pdf](http://www.oeko.de/oekodoc/1318/2011-437-de.pdf)
- (34) Döring, M., Trampe, W.: Sprache, Kommunikation und ökologische Krise, GAIA 19/1, 2010
- (35) Habermas, J.: Diskursethik. Philosophische Texte, Band 3, Suhrkamp, ISBN 978-3-518-58528-3
- (36) Günther, W.: Ekologiaj, ekonomiaj kaj sociaj argumentoj por neŭtrala internacia lingvo, Scienca Revuo,3/2010  
Günther, W.: Dek aspektoj koncerne ekologian amendon de la UEA-statuto. Scienca Revuo 1/2011.
- (37) Manifesto de Prago, UEA, 1995. [eo.wikipedia.org/wiki/Manifest\\_de\\_Prago](http://eo.wikipedia.org/wiki/Manifest_de_Prago)
- (38) Kirf, S.: Esperanto - ein Beitrag zur Umsetzung der Agenda 21?, 2005. [diplom.kirf.de](http://diplom.kirf.de)
- (39) H.D. Hellige, Diskurse und Kulturen der Nachhaltigkeit in historischer Perspektive, artec-paper Nr. 172, Januar 2011, ISSN 1613-4907